

Esperanto-movado en Indonezio: ĉu io lastatempa?

Heidi GOES

Enhavo:

1. Enkonduko	23
2. Komenco en 1894	24
3. La tridekaj jaroj	24
4. La kvardekaj jaroj	25
5. Rekresko	26
6. Liem Tjong Hie	27
7. Rankajo Chailan Sjamsoe Datoe Toemenggoeng	28
8. Forvelko, sed kial?	29
9. Provoj reaktivigi	30
Fontoj	30

Resumo. Oni povus supozi ke la Esperanto-movado en Indonezio, kiu en la lastaj jaroj pli kaj pli viglas kaj kreskas, estas io lastatempa. Jes, antaŭ kelkaj jaroj estis nur kelkaj unuopaj esperantistoj en Indonezio, dum nun estas centoj, kaj ankaŭ ekzistas kelkaj kluboj. Tamen jam antaŭ pli ol cent jaroj, en la komenco de la 20-a jarcento, estis esperantistoj sur la teritorio de la nuna Indonezio. Inter la du mondmilitoj la movado vigliĝis plurflanke: aperis revuoj, (lerno)libroj kaj artikoloj, okazis kursoj sur pluraj insuloj, fondiĝis kluboj kaj asocioj kaj oni propagandis diversmaniere. Pro la dua mondmilito tiu vigla movado disfalis.

Post la sendependiĝo la movado denove ekfloris sub la gvido de la indoneziano Rankajo Chailan Sjamsoe DATOE TOEMENGGGOENG, helpata de malnovaj esperantistoj. En 1952 ŝi starigis Indonezian Universalan Esperanto-Asocion, poste nomitan *Indonezia Esperanto-Asocio*. Plejparto el la movado en la sekva jardeko en Indonezio iniciatiĝis pro ŝia laboro, sed ankaŭ LIEM Tjong Hie, kiu jam antaŭ la milito komencis agadi, daŭre multe laboris kaj eldonis. Bedaŭrinde en novembro 1962 sinjorino Toemenggoeng forpasis, kaj iom poste ankaŭ la Esperanto-movado. Tamen la esploroj malkaŝis ke ne pro ŝia forpaso, sed pro politikaj kaŭzoj la movado tute forvelkis.

1. Enkonduko

Ĉi-artikole mi skizos unue la ĝeneralan evoluon de la Esperanto-movado en Indonezio kaj ilustras tion per ekzemploj de agado. Poste mi iom pli profunde traktos du motorojn de la iama movado en Indonezio: s-ron LIEM Tjong Hie en sekcio 6 kaj s-inon Rankajo Chailan Sjamsoe DATOE TOEMENGGGOENG en sekcio 7. Fine mi skizos la periodon post la forvelko de la movado en la 60-aj jaroj, ĝis ĵus antaŭ ĝia revigliĝo antaŭ kelkaj jaroj.

2. Komenco en 1894

La plej frua mencio pri esperanto kiun mi trovis ĝis nun en la indonezia gazetaro — tiam ankoraŭ nederland-hindia — estas en la gazeto *Het nieuws van den dag: kleine courant* de la 8-a de julio 1894 (transprenita ankaŭ en *De Locomotief: Samarangsch handels- en advertentieblad* de la 15-a de aŭgusto 1894), kiu prenis la novaĵon el la rusa gazeto *Nedelja* de la 12-a de junio, kiu aperigis leteron de Lev TOLSTOJ (1828–1910) pri esperanto. En la sekvaj monatoj kaj jaroj de tempo al tempo aperis artikoloj en la nederland-hindia gazetaro, foje pozitivaj, foje negativaj, foje teoriaj, foje raportantaj pri esperanto-aranĝoj aŭ anekdotoj el Eŭropo, foje pri la kresko de la movado en Nederlando, foje kiel subjekto de ŝerco aŭ de komparo. Cetere aperis ankaŭ artikoloj pri aliaj novaj planlingvoj.

La unuaj esperantistoj estis eksterlandanoj, precipe nederlandaj kaj britaj oficistoj, oficiroj, maristoj, entreprenistoj kaj instruistoj, kiuj plejparte ne estis aktivaj en la Esperanto-movado. En la 20-aj jaroj tamen ekestis agado, kaj de eksterlandanoj kaj de lokanoj. En 1922–23 aperis *Esperanto — propagandablad der Nederlandsch Indische Esperantisten-vereeniging*, de Albert KNEGT en Banjoewangi (nun Banyuwangi), Orienta Javo. La protestanta pastro Richeld Willem Frans KYFTENBELT (Soerabaya 1865-11-05 — Utrecht 1952-01-11) komence de 1923 starigis Esperantan Virinan Klubon en Menado, Celebeso. La membroj estis enlandanoj, eŭropanoj kaj ĉinoj. Kiel sekvo de la skriba kurso en la gazeto *Neratja* en 1922 sub la gvido de P. W. VAN DEN BROEK, Kamso WIRDJOSAKSONO eldonis en 1924 en Klaten la propagandan gazeton *India Esperantisto* en la malaja, kun interalie esperantolecionoj.

En 1926 estis pluraj prelegoj pri esperanto, ekzemple en Bandoeng (nun Bandung) kaj Soerabaja (nun Surabaya) fare de J. VAN REES, kaj en Soerabaja ankaŭ de R. W. F. Kyftenbelt. Tiu ĉi komencis kurson en la Kristana Marista Domo kaj en la loka lernejo por nederlandanoj, sed post kelkaj monatoj li jam estis translokita al Pontianak (Okcidenta Kalimantan). La lecionoj estis transprenitaj de H. Jansen respektive J. H. A. Sens. En Surabaya estis ankaŭ 14 personoj kiuj sekvis esperantan kurson pere de la skriba kurso de la klubo de Nijmegen en Nederlando. Dum la kongreso de la instruistoj en decembro 1928 estis du proponoj rilate al la enkonduko de esperanto en la lernejojn, kaj ambaŭ proponoj estis akceptitaj.

3. La tridekaj jaroj

Sekvajare kreiĝis laboralianco sub la nomo *Unuiĝo de Geesperantistoj en Nederlanda Hindujo*; nederlandlingve *Vereeniging van Esperantisten in Indië*. Liem Tjong Hie estis la fondinto, sed malgraŭ liaj entuziasmo kaj laboremo, kaj la senpaga membrereco, la nombro de aliĝintoj en la unuiĝo estis en 1930 laŭ li mem “por priplori” (*Hinda Esperantisto* 1930). Li tamen daŭrigis la aperigon de sia bulteno *Hinda Esperantisto* ĝis minimume 1934.

La *Orienthinduja Centra Esperanto-Organizo* (OCEO), fondita en 1933, estis “neŭtrala federacio de grupoj, kiuj estas aŭtonomaj kaj al kiuj la neŭtraleco ne estas deviga” (La Praktiko 1933b). La sekretario estis F. W. Buenting en Batavia

(nun Ĝakarto). La membroj estis eŭropanoj, indiĝenoj kaj ĉinoj sur la insuloj Borneo, Sumatro, Javo kaj Celebeso. Ĝi eldonis gazeton kaj perleterajn kursojn, malajlingvan kaj nederlandlingvan. La malajlingvan gvidis Kamsu Wirjosaksono en Klaten. En aŭgusto 1933 la membronombro de OCEO atingis jam 358. Bone sukcesis ĝia radiokurso en Batavia, aranĝita kun helpo de Batavia Radio-Unuiĝo kaj gvidata de G. H. De Heer. En 1933 estis kurso en Balikpapan, Kalimantan, iniciatite de tri indonezianoj: Servius Mamesah, A. Najoan kaj J. Palit.

Alia ekzemplo de agado de indonezianoj en la tridekaj jaroj estas la aperigo en 1935 en Makassar, Celebeso, de la revuo *La Sperto*, kiu havis varian kaj origin-alan enhavon. Ĝiaj redaktoroj estis A. R. Mewengkang kaj P. Mamesah. La artikoloj estis verkitaj en la malaja, esperanto kaj la angla. Ĝi enhavis interalie esperantokurson, artikolojn pri politiko kaj industrio en Indonezio, pri esperanto en Makassar kaj originalan poezion. Sed ankaŭ ĝi nur mallonge vivis. La sekvan jaron fondiĝis en Makassar *Selebesa Esperanto-Asocio* [tiel], danke al la iniciato de Servius Mamesah. La kasisto Tarachand estis “brithindujano kiu tre aktive kunlaboris kun la indonezianoj por la disvastigo kaj propagando de Esperanto inter sianacianoj en Makassar” (Heroldo de Esperanto 1936). Ĉiuj aliaj estraranoj estis indonezianoj: prezidanto Abdul Malik, sekretario Sahibu kaj estraranoj E. M. Anang kaj Rafiuddin.

En 1936 fondiĝis *Nederlandindia Societo Esperantista “La Estonteco Estu Nia”*. La asocio volis ligi precipe nederlandanojn en Nederlanda Hindio. Ĝia revuo, *Nia Organo*, estis redaktata de K. Gorter. La asocio plurfoje sukcese propagandis en la amaskomunikiloj: ekzemple aperis esperantokurso en la gazeto *De Malanger*; L. Schoutens faris radiokurson ĉe la radio de Malang; aperis dek artikoloj pri esperanto en la gazeto *Soerabaja-Post* (verkitaj de J. F. L. Lumaye Schuld). En 1938 estis ankaŭ ekspozicio de esperantoverkoj en Soerabaja. La propagando rezultigis plurajn kursojn kaj fondiĝis pliaj sekcioj de la Societo, ekzemple *Cheribonse Esperanto-Club* kaj *Bandoengse Esperanto-Club*.

La movado ŝajnis sukcesi kaj vivi, tamen jam en la 30-aj jaroj estis cenzuro: ne ĉiuj esperantaj periodaĵoj rajtis eniri la landon. Temis precipe pri maldekstremaj revuoj kaj libroj. Samtempe ankaŭ ne-esperantaj sendaĵoj, de ekstremdekstraj al kristanaj al maldekstremaj, ne rajtis eniri la landon, do ne temis pri io nur esperanta.

4. La kvardekaj jaroj

En 1940 estis Delegitoj de UEA en Bandoeng, Batavia, Cheribon, Jogjakarto, Garoet (nun Garut) kaj Sebelawan; kursoj okazis en Bandjarmasin, Bandoeng, Blitar kaj Cheribon. En Bandoeng la loka klubo organizis en marto 1940 sukcesan festenon kun ekspozicio. En la septembra-oktobra numero de *Nia Organo* oni publikigis la decidon kontakti la Internacian Esperanto-Ligon por fariĝi ĝia aliĝinta asocio.

En la fino de 1940, post pluraj provoj, oni sukcesis eldoni la nederlandlingvan lernolibron *Ons Eigen Leerboek*, same kiel *Nia Organo* redaktitan de K. Gorter. La 14-an de januaro 1941 C. M. Hamaker faris sukcesan propagandan prelegon en Garoet. Granda nombro da ĉeestantoj aliĝis al kurso gvidota de li. En novembro



Liem Tjong Hie en Semarang, Javo, 1930. Li montras al sinjoro Scherer la ŝtofojn kiujn ŝatas javaj sinjorinoj.


1941 oni anoncis la unuan jarkunvenon en Bandoeng, la 26-an kaj 27-an de decembro 1941. (Ĉar mi ne trovis raportojn pri ĉi tiu jarkunveno, mi ne scias ĉu ĝi vere okazis.) Nur kelkajn semajnojn poste la dua mondmilito fariĝis realaĵo ankaŭ por tiu lando, kaj *La Estonteco Estu Nia* ĉesis funkcii. La movado disfalis kaj multaj esperantistoj pereis en la kontraŭjapana batalado aŭ en la japanaj koncentrejoj. Pri la dumilita periodo mi ne trovis multajn spurojn pri esperanto: anonco en Sinar Baroe 1945 pri koresponda kurso-entrepreno kiu ankaŭ proponis esperanton estas la sola tia spuro ĝis nun trovita.

5. Rekresko

Post la milito la movado devis rekreski. Tio okazis danke al la laboro kaj instigo de Rangkajo Chailan Sjamsoe Datoe Toemenggoeng, pri kiu vi povas legi iom pli profunde en sekcio 7 sur paĝo 28. Ŝi kreis en 1952 la Indonezian Esperanto-Asocion. Ŝi eldonis de 1953 ĝis 1960 neregule revuon, kiu ŝanĝis sian nomon kelkfoje kaj fine nomiĝis *Voĉo el Indonezio – Oficiala organo de Indonezia Esperanto-Asocio*. Jam baldaŭ post la fondiĝo, Datoe Toemenggoeng instruis en diversaj urboj. Tiel stariĝis pluraj sekcioj. En 1959 estis jam dek krom la centro en Ĝakarto: en Bandung, Jogjakarto, Magelang, Lubuk Linggau, Semarang, Surabajo, Malang, Den Pasar, Waingapu kaj Makassar. Do ses sekcioj en Javo, plus po unu en la insuloj Sumatra, Bali, Celebeso kaj Sumba.

De 1958 ĝis 1959 Liem Tjong Hie eldonis la revuon *Indonezia Esperantisto*, tiel ke en tiu periodo aperis samtempe du indoneziaj esperantorevuoj. La asocio ankaŭ okazigis ekzamenojn kaj diplomdisdonajn festojn. Kaj en 1959 ĝi okazigis kunvenon,

artvesperon kaj ekspozicion, kaj kunvenojn en pluraj urboj por festi la 100-jaran datrevenon de Zamenhof. La asocio volis ankaŭ okazigi kongreson, sed fine okazis en aprilo 1960 konferenco en Ĝakarto, ĉar ĝi ne ricevis permeson por granda kongreso en Bandung. Ĉeestis reprezentantoj de pluraj ambasadoj kaj ankaŭ delegitoj de kelkaj indoneziaj ministerioj.



Malaja ŝlosilo

6. LIEM Tjong Hie

LIEM Tjong Hie naskiĝis la 15-an de januaro 1906 en Semarang, Javo. Li studis en la tieaj nederlandaj lernejoj kaj eble tie konatiĝis kun esperanto, ĉar jam en 1919, nur 13-jara, li esperantistiĝis. En 1924 li eldonis la unuan libron en esperanto pri Javo, *Javaj legendoj kaj fabloj*, de li (re)verkitan kaj tradukitan. En la sama jaro li la unuan fojon fariĝis Delegito de UEA, kio li regule estis ĝis 1989. En 1925 li ekredaktis la revuon *Hinda Esperantisto*, kiu aperis neregule ĝis 1934. Li ankaŭ fondis la eldonejon kaj kursejon *Ekstremorienta Esperanto-oficejo kaj Esperanto-Instituto* 'Centraal Esperanto-Bureau & Esperanto-Instituut'.

En 1927 Liem Tjong Hie tradukis kaj eldonis la faman rakonton de Multatuli (1820–1887) *Historio de Saidjah kaj Adinda*. Ankaŭ plurajn lernolibrojn li verkis kaj/aŭ eldonis, kaj en la loka lingvo, kaj en la nederlanda: ekzemple la malajan

ŝlosilon (tradukitan en 1928, sed, pro teknikaj problemoj ĉe la presisto Belga Esperanto-Instituto, presitan nur en 1933), *Esperanto en zĵjn verbreiding* kun antaŭvorto de J. H. A. Sens, pri la disvastiĝo de esperanto en la mondo (1931), la lernolibron *Leerboek der wereldhulptaal Esperanto* (1932) kaj la informlibreton *Apa itoe Esperanto?* (1933).

Li ankaŭ tradukis la *Fundamenton* en la indonezian. Sub la pseŭdonimo RIMBA Djohar li verkis ankaŭ en la indonezia, i.a. pri religio kaj la ŝtata filozofio *Pancasila* kaj sub la pseŭdonimo HIE Kiguj li verkis la infanlibron *La varma sudo kaj la frosta nordo* en 1966, eldonitan en Ĉinio. Li aperas ankoraŭ en 1981 en esperantista adresaro, kiel universitata docento.

Laŭ informoj ricevitaj pere de liaj kolegoj, li instruis ekde 1964 anglan komercan korespondadon, leterverkadon kaj Pancasila (la nacian ideologion) en *Universitas 17 Agustus 1945*. Ekde la 5-a de junio 1970 ĝi ne plu estis universitato sed kolegio *Akademi Bahasa 17 Agustus 1945* (mallonge: *Akaba '17'*) en Semarang. Li forpasis en aprilo 1991.

7. Rankajo Chailan Sjamsoe DATOE TOEMENGGOENG



Datoe Toemenggoeng en la Esperanto-domo 1953. El ŝia foto-albumo por la ekspozicio en Montevideo.

Rankajo Chailan Sjamsoe DATOE TOEMENGGOENG naskiĝis la 6-an de aprilo 1905 en Bukittingi, Sumatro. Ŝi apartenis al la Minangkabau-popolo, kiu havas matri-

arkan kulturon. Pri tio kaj pri multaj aliaj por- kaj pri-virinaj temoj ŝi ofte prelegis kaj verkis, kaj en esperanto, kaj en la indonezia kaj angla. Ŝi estis defendanto de la virinaj rajtoj kaj aktivis kontraŭ la infankomerco. Ŝi estis konata ankaŭ pro tio ke ŝi organizis ĉiujare la Komercon Borson por Virinoj en Ĝakarto kaj estis dum jaroj redaktoro de la porvirina revuo *Pedoman Isteri*. En 1950 ŝi lernis esperanton kaj ekde 1951 partoprenis plurajn universalajn kongresojn kaj prelegis interalie en la Internacia Somera Universitato en Oslo (1952) kaj ankaŭ en Montevideo, kie ŝi faris prelegon okaze de la malfermo de la Universala Ekspozicio (Voĉo de Indonezio 1956). Ŝi vigligis kaj plifortigis la Esperanto-movadon en Indonezio ekde 1952, kiam ŝi revenis el Eŭropo post sia unua universala kongreso kaj prelegrondvojaĝo. Ŝi estis prezidantino de Indonezia Esperanto-Asocio, de Sudazia Esperanto-Federacio kaj de Islama Esperanto-Asocio. Ŝi iniciatis kaj subtenis la eldonon de pluraj lernolibroj kaj vortaroj verkitaĵ de aliaj indoneziaj esperantistoj. La 23-an de novembro 1962 Datoe Toemengoeng forpasis, nur 57-jara.



Klarigoj de Datoe Toemengoeng mem en sia foto-albumo por Montevideo: “Djakarta, 1951 — komenco de nia movado — la unua kurso”. Poste la nomo de la landa asocio ŝanĝiĝis al Indonezia Esperanto-Asocio. Ŝi estas la unua virino dekstre de la flago.

8. Forvelko, sed kial?

Iom da tempo dum la esploroj mi ligis la forvelkon de la movado en Indonezio al la morto de Datoe Toemengoeng, ĉar tio okazis en la sama periodo. Sed el interparoloj kun veteranoj evidentiĝis ke io tute alia kaŭzis la preskaŭ tutan malaperon de la movado en la 60-aj jaroj. En 1965 militistoj volis preni la povon en Indonezio — ŝajne kun ia apogo de komunistoj, sed la cirkonstancoj neniam fariĝis klaraj. Dum tiu malfacila periodo Suharto prenis la povon kaj komencis kontraŭ-

komunisman kontraŭpuĉon. Laŭ taksoj duona miliono da komunistoj aŭ personoj kiujn oni supozis komunistoj estis murditaj kaj miliono da homoj estis arestitaj.

En tia etoso la esperantistoj ne plu kuraĝis kunveni. Ĉu ili estis komunistoj? Eble parto el ili estis, eble ne, sed ili havis sufiĉe da kaŭzoj timi esti rigardataj kiel komunistoj: multaj el la esperantistoj estis tute aŭ parte ĉindevenaj indonezianoj. Aldone la indoneziaj esperantistoj tiam havis multe da kontaktoj kun la Esperanto-movado en komunismaj landoj, kiel Ĉinio kaj diversaj landoj en Orienta Eŭropo. Oni interkorespondis, kaj ili ricevis esperantajn revuojn el tiuj landoj. Pro la persekutoj ili timis plu kunveni, eĉ plu posedi esperantaĵojn, kio sekve rapide kaŭzis la malaperon de la movado.

Poste la reĝimo postulis ke la indonezianoj kun ĉinaj nomoj devas ŝanĝi siajn nomojn al indoneziaj. Almenaŭ parto el ili uzis kiel inspiron por tio esperantajn vortojn kaj eĉ donis al siaj infanoj esperantan nomon. Tiel ekzemple estis aŭ estas esperantistoj en Indonezio kun nomoj kiel Heroa, Esperantista, Eta Esperantina, Eriko Sunardo k.t.p.

9. Provoj reaktivigi

Ĝis nun la esploroj montris nur kelkajn provojn reaktivigi la movadon en Indonezio post tiu malfacila periodo. En Semarang ekzemple fondiĝis unue en 1975 kaj poste ree en 1990 Indonezia Esperanto-Societo, kiu interalie eldonis minimume 11 numerojn de *Voĉo el Indonezio* ekde 1991. La Societo aktivis tre neregule, kun laŭ la nunaj esplorzultoj tre longaj periodoj de ne-aktivado ĝis la fino de 2007, kiam ĝia motoro, Francis D. Yury (Semarang 1948-04-22 — Semarang 2007-11-23), forpasis kaj la Societo tute ne plu aktivis. Fine de la antaŭa jarcento la veterano Riyanto Husadha de tempo al tempo provis instrui al novuloj en Bogor. Poste unuopaj individuoj en Indonezio komencis lerni esperanton, precipe per la interreto. Aldone daŭre restis kaj restas ankaŭ kelkaj veteranoj en la lando. De nur malplimulto el ili la eksterindonezia Esperanto-movado sciis ion. Tamen estis eĉ ne komenco de kreo de movado fare de tiuj unuopuloj. Kaj tiuj unuopuloj kaj eksterlandaj movadoj ignoris aŭ forgesis ke antaŭe estis vigla movado en Indonezio.

Pro tio mi komencis miajn esplorojn, kiuj havis kiel flankefikon rekreiĝon de la movado en Indonezio ekde novembro 2009. Sed tio estas jam alia temo . . .

Se vi havas demandojn pri la historia movado mi volonte respondos laŭ miaj ebloj. Se vi havas aldonojn, mi volonte scius pri tio.

Fontoj

1. Artikoloj el revuoj, sen mencio de aŭtoro

1.1. *De Indische Courant*

1926. Esperanto. *De Indische Courant*. 1926-11-04. 6/43:5.

1926. Esperanto. *De Indische Courant*. 1926-12-16. 6/79:2.

1926. Esperanto. *De Indische Courant*. 1926-12-17. 6/80:2.

1927. Esperanto. *De Indische Courant*. 1927-01-19. 6/106:2.

1927. Esperanto. *De Indische Courant*. 1927-01-20. 6/107:2.

1927. Esperanto cursussen. *De Indische Courant*. 1927-04-07. 6/170:2.
1928. Onderwijs. Esperanto. *De Indische Courant*. 1928-08-24. 7/284:6.
- 1.2. *De Locomotief: Samarangsch handels- en advertentieblad*
1894. Het oordeel van Graaf Tolstoi over eene wereldtaal. *De Locomotief: Samarangsch handels- en advertentieblad*. 1894-08-15. 43/188:2.
- 1.3. *El Popola Ĉinio*
1963. S-ino Rkj. Ch. Sj Datoe Toemenggoeng forpasis. *El Popola Ĉinio*. [14]/1:44.
- 1.4. *Esperanto Triumfonta*
1923. Saluto al Celebes. *Esperanto Triumfonta*. 1923-05-06. [4]/135 (suma): [2].
1924. Kroniko — Azio — Java insulo (Nederlanda Hindujo). *Esperanto Triumfonta*. 1924-04-13. [5]/187 (suma): [3].
- 1.5. *Heroldo de Esperanto*
1933. Nederlanda Hindujo. *Heroldo de Esperanto*. 1933-01-08. 14/1 (suma: 706): 3.
1936. Estraro de Selebesa Esperanto-Asocio. *Heroldo de Esperanto*. 1936-10-15. 16/3 (suma: 898): 2.
- 1.6. *Het nieuwsblad voor Sumatra*
1952. Mevr. Datoek Toemenggoeng, La batiko kiel pasporto. *Het nieuwsblad voor Sumatra*. 1957-09-06. 10/2679 (sume): 2.
- 1.7. *Het nieuws van den dag: kleine courant*
1894. Het oordeel van Graaf Tolstoi over eene wereldtaal. *Het nieuws van den dag: kleine courant*. 1894-07-08. 21/27:2.
- 1.8. *Hinda Esperantisto*
1930. Unuiĝo de Geesperantistoj en Ned. Hindujo. *Hinda Esperantisto*. 2 [4]/8 (sume — marto-aprilo): [5]. (rimarkigo: la revuo aperis 2 fojojn en 1925, kaj poste nur ekde 1928. Ekde 1929 sur la revuo aperas refoje ke estas la “unua jaro” sed la revuoj havas daŭrajn numerojn ekde 1925. Do devus esti la 4-a jaro.).
- 1.9. *Nia Organo*
1936. Esperanto Radio-Kurso. *Nia Organo*. 1/1 (nov.): 5.
1937. Korte berichten — Esperanto-cursus in Indisch dagblad. *Nia Organo*. 2/2 (dec.): 113 (sume).
1938. Mededelingen. *Nia Organo*. 2/3 (jan.): 125 (sume).
1938. Mededelingen. *Nia Organo*. 2/10 (aŭg.): 202 (sume).
1940. Mededelingen. *Nia Organo*. 4/11-12 (sep.-okt.): 77-78 (sume ekde la unua numero de la kvara jaro – okt. 1939).
1941. Mededelingen. *Nia Organo*. 5/3 (jan.): 100 (sume ekde la unua numero de la kvara jaro – okt. 1939).
1941. (Sen titolo) *Nia Organo*. 6/1 (nov.): 1 kaj 12.
- 1.10. *La Praktiko*
- 1933a. (Sen titolo, teksto sub foto). *La Praktiko*. 2/1:8.
- 1933b. Al la venko! – 107. Esperanto-organizo en Orienta Hindujo. *La Praktiko*. 2/6:4.
- 1933c. Informoj – Nederlanda Hindujo. *La Praktiko*. 2/6:11.
1952. (Sen titolo). *La Praktiko*. 21/4-5:47.
- 1.11. *Sinar Baroe*
1945. (Anonceto) Selalu Berhatsil. *Sinar Baroe*. 1945-04-13. 4/853:4.

1.12. La Sperto

1935. 1/1 kaj 1/2 (jan. kaj feb.).

1.13. Utrechtsch Nieuwblad

1952. (Sen titolo) Op den 11den Januari ... *Utrechtsch Nieuwblad*. 1952-01-12. 59/216:12.

1952. Ds. Kyftenbelt overleden. *Utrechtsch Nieuwblad*. 1952-01-12. 59/216:2.

1.14. Voĉo el Indonezio

1956?. Pedato di utjapkan oleh Rkj. Datoe. Sen numero, [januaro 1956?], p. 8.

1960. (diversaj artikoloj). *Voĉo el Indonezio*. 8/2:1–5 kaj 9–13.

1.15. Revuo Esperanto

1931. Mondvojaĝo de l' speciala delegito de ICK, Sinjoro Jos. R. Scherer. *Esperanto* 27/7–8, p. 10.
(La foto de Liem Tjong Hie sur paĝo 26.)

2. Libroj

Enciklopedio de Esperanto. 1979. Red. L[a]jos Kókény; V[ilmos] Bleier. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio. Represo de la unua eldono el 1933–1934. Liem: p. 339.

Poez, H. A., (red.). 1994. *Politiek-politioneële overzicht van Nederlandsch-Indië*. Bronnen-publikatie. Deel IV 1935–1941. Bewerkt en ingeleid. Leiden, KITLV.

3. Jarlibroj kaj kongreslibroj

1924. *Oficiala Jarlibro de la Esperanto-Movado*. Ĝenevo: Universala Esperanto-Asocio.

1989. *Jarlibro 1989*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

4. Intervjuoj kaj leteroj

Korespondado inter Liem Tjong Hie kaj la eldonanto (Internacia Centra Komitato) kaj la presisto (Belga Esperanto-Instituto) pri la eldono de la malaĵa ŝlosilo, 1925–1934 (troviĝas en la arkivo de UEA).

Intervjuo kun sinjorino Marjamah, la vidvino, kaj Andri Yudi Handoko, unu el la tri filoj de Francis D. Yury, 2009-11-14.

Intervjuo kun sinjoroj Koencoro kaj Suwanto, kolegoj ĉe *Akademi Bahasa 17 Agustus 1945*, 2009-11-14.

Intervjuo kun LIEM Thiam Tjiok, la plej juna filo de Liem Tjong Hie, 2009-11-15.

Intervjuo kun sinjorino Ishari Morrees, antaŭa direktoro de *Akademi Bahasa 17 Agustus 1945*, 2009-11-15.

Letero de Heroa WIBISONO (Yogyakarta, 1941-04-22) de 2009-12-05.

Retmesaĝoj de Evy Ridwan, koleginino de Liem Tjong Hie, 2010-02-28, 2012-10-07.

5. Retejoj*5.1. Pri R. W. F. Kyftenbelt*

http://records.ancestry.com/RichelWillem_Kyftenbelt_records.ashx?pid=66631011
(kontrolita 2013-04-07).

www.hetutrechtsarchief.nl/collectie/kranten/un/1952/0112 (kontrolita 2013-04-07).

<http://geneagraphie.com/getperson.php?personID=I371822&tree=1> (kontrolita 2013-04-07).

5.2. Pri R. C. S. Datoe Toemenggoeng

www.fembio.org/biographie.php/frau/frauidatenbank (kontrolita 2013-04-07).

Heidi Goes naskiĝis je 1976-03-15 en Oostende, studis afrikajn lingvojn kaj kulturojn de 1995 ĝis 1999 kaj poste evolukunlaboradon (1999–2001) kaj agrikulturan evoluadon (2001–2002) en la universitato de Gento, patriniĝis en majo 1997 kaj loĝas de septembro 2000 en Bruĝo.

Ŝi esperantistiĝis en septembro 1990. Naŭ jarojn poste ŝi finverkis licenciulan disertaĵon pri la esperanto-movado en Afriko, post esploroj en bibliotekoj kaj surloke en Tanzanio kaj Togolando. Ŝi aktivas en la loka bruĝa esperanto-klubo kaj en la internacia vegetarana esperanto-movado. En junio 2007 aperis ĉe UEA ŝia libro *Afero de espero* pri la historio de la esperanto-movado en Afriko, bazita sur la menciita disertaĵo kaj novaj bibliotekaj esploroj. Ekde tiam ŝi esploras pri la historio de la esperanto-movado en Indonezio, pri kio jam aperis tri artikoloj en *Esperanto en Azio*.

En novembro 2009, septembro–oktobro 2010 kaj julio kaj decembro 2012 ŝi vojaĝis por instrui kaj esplori en Indonezio. Ŝi planas vojaĝi ankaŭ en marto-aprilo 2013.

Heidi instruis aŭ enkondukis esperanton al centoj da indonezianoj de diversaj aĝoj. Pliaj centoj aŭ miloj da indonezianoj informiĝis pri esperanto pro la diskonigo pri la kursoj en la reto kaj en lokaj gazetoj. Dum tiuj vojaĝoj ŝi ankaŭ kontaktis lokajn esperanto-pionirojn aŭ ties infanojn, kaj esploris en lokaj kaj nacia bibliotekoj. Prepare al la unua instruvojaĝo ŝi kunkompilis kaj kunredaktis novan, modernan ŝlosilon por indonezianoj, *Kunci Esperanto*, kiun UEA publikigis en oktobro 2009. Ŝi kunredaktas *Esperanto en Indonezio*, trovebla ĉe <https://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/bulteno> (kontrolita 2013-04-07).

Retpoŝta adreso: heidi.goes@gmail.com

Paperpoŝta adreso: Assebroeklaan 2, BE-8310 Brugge, Belgio.